

Joseph Freiherr von Eichendorff,

## Printempa nokto

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Super mi tra la aeroj  
Migrobirdojn aŭdas mi.  
Jam odoras aromeroj  
Kaj ekfloras ĉie ĉi.

Emas mi jubili, plori,  
Nekredebla estas ĝi!  
Malnovaĵoj volas sori  
Kun la luna bril' al mi.

Steloj diras tion, kion  
Songas arboj ĉirkau mi,  
Najtingaloj kantas tion:  
Estas via ŝi, jes ŝi!

*Traduko de la Germana poemo "Frühlingsnacht" de JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF (\*1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2001-04-07.*

*MR-345-1a / Arg-220-436 (2004-04-09 17:01:32)*